


ESPERANTO EN INDONEZIO

duonjara bulteno jaro 4 numero 2 (7) decembro 2014

- AVANTAĜOJ
POR ESTI
MEMBROJ DE IEA

- INTERVJUO DE
ĴURNALISTO:
ĴURNALO DE SINDO



- RAPORTO PRI
NOVA E-KLUBO
EN JOGJAKARTA

- LA 100-A UK
EN LILLE KAJ
GAZETARA KAMPANJO

- ALIĜI SENPAGE
AL UEA PERE
DE KAEM

- INFANO EN
MALRIĈA FAMILIO
NE HAVAS FRAT(IN)ON

Karaj legantoj!

En ĉi-numero vi povas legi ĉefajn temojn pri la vojaĝo en Koreio, pri la programo inter Esperantistoj de Bandung kaj Medan, kaj pri la intervjuo de Ĵurnalisto: Ĵurnalo de SINDO al la E-Klubo de Ĝakarto (*Esperiga Suno*).

Sekvas la legado pri lokaj novaĵoj kie troviĝas diversaj artikoloj kaj raportoj de samlandaj geamikoj; komence de la 4-a datreveno de la E-klubo de Ĝakarto (*Esperiga Suno*), la vizito de du gastoj (Esperantistoj) el aliaj landoj, kaj la formo de la nova E-klubo en Jogjakarto.

Atentu bone ankaŭ pri grava novaĵo de IEA (Indonezia Esperanto-Asocio) pri la aliĝo kaj la avantaĝoj esti la membro de IEA. Poste artikoloj kaj aliaj interesaj informoj pri movado, kiel la 100-a UK en Lille, la aliĝo de UEA pere de KAEM, kaj la kotiztabelo por la Universala Kongreso, kiuj riĉigas la enhavon de nia bulteno.

En la lasta parto, vi povas legi senditajn artikolojn de Suda Koreio kiel Esperanto unuigos la homaron kaj infano de malriĉa familio ne havas frat(in)on.

Bobby Mulyadi W. nome de la redakcia teamo

Para pembaca yang terhormat,

Pada edisi kali ini, Anda dapat membaca beberapa artikel pada tema utama, antara lain tentang perjalanan di Korea Selatan, program antara Esperantis Bandung dan medan, serta mengenai wawancara kepada klub Esperanto Jakarta (*Esperiga Suno*) dalam koran SINDO.

Lalu ada juga berbagai berita lokal tentang artikel dan laporan dari Esperantis Indonesia, seperti perayaan ulang tahun ke-4 klub Esperanto Jakarta (*Esperiga Suno*), kunjungan dua tamu (Esperantis) dari luar negeri, serta pembentukan klub Esperanto baru di Yogyakarta.

Selain itu, ada berita penting yaitu langkah dan keuntungannya menjadi anggota IEA (Asosiasi Esperanto di Indonesia), juga artikel dan informasi menarik lainnya tentang pergerakan Esperanto. Selain itu, Anda dapat membaca artikel tentang Kongres Universal ke-100 di Lille, cara bergabung menjadi anggota di UEA per KAEM, serta tabel harga untuk Kongres Universal yang turut serta memperkaya isi buletin kami.

Pada bagian terakhir, Anda dapat membaca dua artikel dari luar negeri (Korea Selatan) yaitu Esperanto mempersatukan umat manusia serta Anak dari keluarga tak mampu yang tidak punya saudara.

Akhir kata, editor ingin mengucapkan: Selamat membaca!

Bobby Mulyadi W. atas nama dewan penyunting

ESPERANTO EN INDONEZIO adalah buletin resmi dari Indonezia Esperanto-Asocio (berdiri tahun 2013) • Diterbitkan di Indonesia dua kali setahun • Terbit sejak 2011 • Buletin didapatkan seluruh anggota IEA secara cuma-cuma • Penyunting kepala: Bobby Mulyadi W. • Penyunting Pelaksana: Iliá Sumilfia Dewi • Alamat Redaksi: Wisma Sarinah, Lantai 1 (Gripwell), Jl. Majapahit No.8, Jakarta Pusat 10160 • Surel: redakcio-ideo@googlegroups.com • Telepon: 0811-1773387 • **Batas waktu penerimaan artikel untuk edisi berikutnya adalah 20 Mei 2015**



La Misia Vojaĝo en Koreio

Vojaĝo al Koreio

Inter la 22a ĝis la 31a de majo, mi vojaĝis en Koreio. Tio estis mia unua vojaĝo planita lastjare. Kial Koreio? Ĉar ĉiuj aferoj rilataj al tiu lando estas tre famaj en mia lando, Indonezio: manĝaĵo, kulturo, turismo, dramo ktp. Pro tio mi pli interesiĝis pri Koreio. Alia kialo estas, ke mi ŝatus viziti koreajn E-amikojn, kiujn mi ekkonis, kiam skajpe mi ĉeestis en la kurso de Seula Esperanto-Kulturcentro (SEK) kaj paroligis la kursanojn en Esperanto. Kombinite de planita itinero de s-ro LEE Jungkee, prez. de SEK, kaj mia propra agado, mi agrable pasigis mian tempon en la ĉefurbo Seulo kaj aliaj apudaj urboj. Mi ĝuis la 8 tagojn en Koreio kun afablaj kaj helpemaj esperantistoj.

La unua helpema samideano estis Minmin (MIN Hyeonkyeong), ĝenerala sekr. de Korea Esperanto-Asocio (KEA). Matene en la 23a de majo ŝi trankvile atendis min ĉe Incheon-flughaveno kaj unuavide mi rimarkis kaj salutis ŝin pro la verda flago ĉe ŝia mano. Ŝi bonvenigis min kaj ni kune veturis al Seulo tuj post la aĉeto de trajn-bileto. Dum la veturado de ĉ. 1.5 horoj mi sentis min iom dormema pro la sendormo dum la flugado. Atinginte la urban centron, mi ĝojis rigardi la ĉirkaŭaĵon dirante "Mi alvenis al Seulo!". Minmin gvidis min unue al la malnova pordego de la palaco Deoksugung, kiu staras harmonie kun modernaj konstruaĵoj. Antaŭ ĝi, mi spektis la unikan ceremonion por ŝanĝo de gardistoj. Tie mi renkontis s-inon LI Hyon-suk, vicprez. de KEA, kaj kune manĝis la tradician manĝaĵon Chueotang. Ŝi akompanis min en la palaco, ĉar Minmin devis iri al KEA-oficejo. Jam estis la 1-a horo ptm. Ni devis rapide iri al la loko, kie s-ro LEE Jungkee atendas min. Per buso ni finfine ĝustatempe alvenis al tiu loko kaj kun li direktiĝis al la universitato Kyunghee en Seulo, en kiu li havas regulan E-kurson. Mi persone antaŭĝojis renkontiĝi kaj konatiĝi kun la studentoj, pro tio la laceco ĉe mi nature malaperis. Ĉirkaŭ 50 studentoj ĉeestis en la kurso. Mia tasko estis paroligi ilin en Esperanto kaj doni la motivon plu lerni la lingvon al ili, kiuj eklernis ĝin antaŭ 3 monatoj. Ili kuraĝe ĵetis diversajn mallongajn demandojn pri Indonezio kaj atente aŭskultis miajn respondojn. Ankaŭ mi havis ŝancon aŭskulti iliajn respondojn al miaj demandoj. Ŝajnis, ke la tempo flugis tre rapide pro la amika kaj agrabla konversacio inter mi kaj ili. Mi adiaŭis la kursanojn kun ilia granda aplaŭdo.

Mi faris la paroligan agadon ankaŭ en du aliaj universitatoj: Kyunghee Univ. en Suwon en la 27a kaj Wonkwang Univ. en Iksan en la 29a. La kursanoj de la tri universitatoj en Seulo, Suwon kaj Iksan estis entute 130 gestudentoj.

Antaŭ ol iri al Anima(KIM Okjeong), ĉe kiu mi gastos dum la restado en Koreio, mi ĝuis vespermanĝon en la universitato kun s-ro LEE Jungkee. Trajne mi atingis la stacidomon, kie Anima jam atendas min. Unuafoje mi renkontis ŝin, kun kiu mi iam interparolis skajpe kaj tuj povis amikiĝi pro ŝiaj afableco kaj helpemo.

Kun samideanoj al bela naturo

Post la bona nokto-ripozo, mi havis pli da energio por akcepti mian duan tagon en Seulo kaj realigi la amuzan semajnfinojn, kiun planis Anima. Kun Suno(KIM Seonwook) kaj Dumina(MIN okkyeong) mi matene ekveturis per aŭto al la monto Ĝirisan, kiu estas fama kun sia bela pejzaĝo kaj freŝa aero. Tio estis sufiĉe longa vojaĝo. Ĉ. 5 horojn mi estis surstrate kaj tagmeze atingis la belan vilaon de Anima, ĉirkaŭitan de la montaro. Unue mi malfermis la okulojn kaj profunde enspiris la freŝan aeron. Iom post iom la bona sento okupis la korpon kaj la menson. Hmm... tiom trankvila mi sentis min. Mi tre ĝojis pasigi la amikan tempon kun la ĉarmaj samideanoj, ĝuante fragojn ĉe korto de la vilao kaj la promenadon sur la monto Ĝirisan. Tiun vesperon ni volis gustumi bovaĵon kuiritan sur brulaj lignokarboj ankaŭ kun Eltena(GIM Inhye), kiu venos de la urbo Busan por ĉeesti en la festo. Ni ĝuis la tre bongustan mangaĵon kaj amuzan babiladon rigardante belajn steletojn sur la ĉielo. Kiel bela estis la nokto!

En dimanĉo ptm, sur la revena vojo al Seulo mi vizitis malnovan tradician vilaĝon, en kiu ankoraŭ oni loĝas tradicie, kaj havis korean tradician manĝadon. Finfine mi iom post iom kutimiĝis al la ĉefmanĝaĵo kimĉio, kies guston antaŭe mi ne ŝatis. Poste mi adiaŭis Eltena ĉe bus-stacio, kaj direktiĝis al la domo de Anima en Seulo. Pri Eltena mi persone havas bonan impreson pro nia preskaŭ samaĝa pensmaniero kaj ŝia bonkonduco.

En elementa kaj meza lernejoj en Seulo

En la 28a, mi vizitis Bongwon mezlernejon, kion Sonorilo (PARK Jongsun) kiel ĝia instruisto okazigis por siaj klasanoj. La lernantoj akceptis min per la

afiŝo, kiun ili mem faris per desegnaĵo kaj informo pri Indonezio. Kun granda ĝojo de iliaj entuziasmoj mi prezentis pri mia lando Indonezio al ili. Bedaŭrinde ili ne lernas Esperanton kiel regulan lecionon, tial tradukisto estis bezonata. Mi ankaŭ montris tradician dancon de Indonezio kaj gvidis ilin kanti indonezian kanton. Post la duhora prelego, mi havis grandan aplaŭdon de ĉiuj kaj memorfoton kun ili.

En la 30a, mi estis invitita de Brila (OH Soonmo, vicprez. de KEA) en Suseong elementlernejo, akompanite de KIM Onnuri (Onia, prez. de Korea E-Junularo). En la lernejo mi ankaŭ spertis mirindan tempon. Mi prelegis pri historio, kulturo kaj demografio de mia lando, por ke la gelernantoj povu havi pli da ideo kaj impresoj pri Indonezio. Ĉirkaŭ 14 gelernantoj atente aŭskultis mian mallongan prezenton, kiun Onia interpretis en la korean. En la lasta paŝo, ili ĵetis demandojn al mi kaj mi ĝoje respondis. Fine ni kune fotiĝis por memoraĵo.

Kun helpemaj samideanoj

Dum mia restado en Koreio, mi preskaŭ ne estis sola. Ĉiuj samideanoj volonte helpis kaj prizorgis mian agadon. Dank' al ili mi vere feliĉis dum la vojaĝo bone aranĝita. Mi havis ŝancon viziti SEK-n, kiu jam sukcese naskis multajn esperantistojn sub la gvido de la prez. LEE Jungkee, kaj gvidate de Elstara (BAK Suhyeon, estro de Seul-filio) viziti la turon sur la monto Namsan, kiu staras centre de Seulo. Sur la alteco mi povis trarigardi la ĉefurbon. Vespere mi ĉeestis en la kunveno de KEA, kaj konatiĝis kun pli da samideanoj kaj havis amikan interparoladon.

En la 26a, la ĉarma amikino Lumluna (JON Soyeon) akompanis min viziti la palacon Gyeongbokgung kaj

la nacian muzeon en ĝi. En la palaco mi sentis la tradician etoson de la dinastio Joseon, en kiu la korea alfabeto Hangulo kaj ĝia skribsistemo Hunminjeongeum estis kreitaj. Post tio mi marŝis al la placo antaŭ la palaco kaj havis ŝancon sperti korean tradician kostumon eĉ senpage. Momente mi ĝuis mian elegantan aspekton kiel koreino. Vespere mi partoprenis en la 4a invitprelego de Rondo Verdulo de SEK, en kiu 13 samideanoj kunsidis. La temo estis pri Indonezio kaj E-movado de la lando. Fine de la prelego mi fiere ricevis la atestilon de Rondo Verdulo, kiu estas honore donita al tiuj, kiuj tralegis 'La 200 bonaj frazoj'-n.

Ankaŭ Akva kaj Pasia (HWANG Sine) helpis min volonte gvidante min al merkato por mia aĉetado por la donaco al miaj familianoj kaj amikoj.

Adiaŭa vespero

Jam proksimiĝis la adiaŭa tempo. Por mi kunvenis ok samideanoj en restoracio apud SEK. Kun vespermanĝo ni interparolis pri diversaj temoj. S-ro LEE Jungkee petis min pri mia impresoj dum la vizito. Mi diris: kvankam mi nun adiaŭas vin, tamen mi certas reenkontiĝi kun vi, kaj preferas diri 'ĝis revido!' dezirante baldaŭan renkontiĝon.

Tiel mi tre ĝoje pasigis la belajn tagojn kaj plenumis la mision por prezenti Indonezion, sperti Esperantujojn de Koreio kaj eltrovi la vojon al verdaj familianoj. Mi pensas, ke la vojaĝo estis tute sukcesa pro la grandaj helpo kaj zorgo de karaj samideanoj en Koreio. Do kun neforgeseblaj memoroj mi estas tre dankema al tiuj, kiuj akceptis min samideane.

Koran dankon el Indonezio!

Ilia Sumilfia Dewi: ilia.dewi@gmail.com



Ilia Sumilfia Dewi kaj korea virino surhavas korean stupon



Ilija Sumilfia Dewi kune kun koreaj esperantistoj



Ilija Sumilfia Dewi kune kun koreaj geinfanoj

Programo inter Esperantistoj en Bandung Kaj Medan

Mi tre volas renkonti kun esperantistoj en la mondo, speciale esperantistoj de alia urbo aŭ loko de Indonezio. En nia lando, Indonezio, troviĝas multaj insuloj. Ĝi estas la unua problemo por renkonti.

Mi havis ŝancon por renkonti esperantistojn de alia urbo en Indonezio. Mi vizitis al Bandung-urbo el Medan-urbo ĉar mia universitato havis stud-vojaĝan programon al Bandung-urbo kaj Ĝakarta-urbo. Ĉar mi tre volas renkonti esperantistojn de Bandung, mi faris enoficigon kun esperantistoj de Bandung.

Ni renkontiĝis en restoracio de Paris-Van-Java-Grand-Vendejo. En kunsido troviĝis 3 esperantistoj. Ili estis Yani, Elsy, kaj Syauqi. Ni diskutis pri niaj kulturoj, niaj spertoj en Esperanto, kaj niaj programoj en ĉiu urbo, Medan kaj Bandung.

Ni diskutis kune pri programo, ĝi nomiĝas "Sahabat Pena Esperanto". Ĉi tiu programo estas por ekzerci kapablon skribi en Esperanto, por plifortigi amikecon inter esperantistoj en urboj de Indonezio, kaj por prepari La Sekvan Esperanto-Kongreson en Indonezio.

Mi esperas ke ĉi tiu programo funkcios bone kaj esperantistoj en Indonezio plifortiĝos kaj pliboniĝos. Do, movadoj de Esperanto en Indonezio ankaŭ plifortiĝos. Tra la novaj ideoj de Esperantaj Programoj, ni faros multe. Vivu Indonezio! Vivu Esperanto!

Saya sangat ingin bertemu dengan para esperantis di dunia, terutama esperantis dari daerah atau kota lain di Indonesia. Negeri kita, Indonesia, ada banyak

pulau. Hal inilah yang menjadi kendala pertama kami untuk saling bertemu.

Saya mempunyai kesempatan untuk bertemu esperantis dari kota lain di Indonesia. Saya dari Kota Medan berkesempatan mengunjungi Kota Bandung, karena universitasku mengadakan program *Study Tour* ke Jakarta dan Bandung. Karena ingin sekali berjumpa dengan para esperantis dari Bandung, saya membuat janji untuk bertemu mereka.

Kami akhirnya bertemu di sebuah restoran di Pusat Perbelanjaan Paris Van Java. Dalam pertemuan, ada 3 esperantis dari Bandung, yaitu Yani, Elsy, & Syauqi. Kami berdiskusi tentang budaya masing-masing, pengalaman kami di dunia Esperanto, dan program-program yang dijalankan di masing-masing kota, Bandung dan Medan.

Kami berdiskusi tentang program yang bernama "Sahabat Pena Esperanto". Program ini bertujuan untuk melatih kemampuan menulis dalam Esperanto, untuk mempererat persahabatan antar-esperantis di kota-kota di Indonesia, dan untuk persiapan Kongres Esperanto di Indonesia ke depannya.

Saya berharap bahwa program ini berjalan dengan baik dan para esperantis di Indonesia akan semakin solid dan berkembang sehingga gerakan Esperanto di Indonesia juga semakin kuat. Melalui ide program Esperanto yang baru ini, kita akan melakukan banyak hal. Hidup Indonesia! Hidup Esperanto!

Verkita de Reza Pahlevi



Presiĝis la 2a eldono!

la ŝlosilon (Kunci) vi povas aĉeti kontraŭ Rp. 10.000,00 / libro.
la libro enhavas gravajn vortojn, por ke vi povu riĉigi vian vortprovizon.

Ĝi enhavas ankaŭ koncizan gramatikon por pligrandigi vian Esperanton-kapablon.

Kontaktu **Ili Dew** ĉe 08111773387 aŭ estraro-indonezia-esperanto-asocio@googlegroups.com.

Intervjuo de Ĵurnalisto; Ĵurnalo de SINDO



La libroj por lerni kaj praktiki Esperanton kune

La 25an de Augusto de 2014, Esperiga Suno de Ĝakarta E-klubo havis sian regulan kunvenon. Tiam la kunveno estis iom malsimila al aliaj ĉar ĉeestis ĵurnalistino de ĵurnalo 'SINDO' kiu antaŭe jam kontaktis min por fari mallongan intervjuon pri Esperanto kaj la agadoj. Fakte jam plurfoje venis ĵurnalistoj kiuj interesiĝas pri skribado de artikolo pri nia klubo. Tio certe estas bona okazo por sciigi pli multe da homoj pri nia lingvo. Bedaŭrinde en tiu ĉi kunveno nur venis 4 klubanoj tamen ni agrable faris la intervjuon dum preskaŭ unu horo. Jen la novaĵo kiu aperis en la gazeto je la 2a de Septembro de 2014:

Satu Bahasa, Bahasa Esperanto!

Bahasa adalah identitas bangsa. Namun, lain cerita dengan bahasa Esperanto, bahasa internasional tanpa embel-embel Negara asal. Bahasa yang sempat dianggap paham garis kiri itu kini mulai diaktifkan kembali oleh Asosiasi Esperanto Indonesia (AEI).

Saluton! begitulah Ilia Sumilfia Dewi, Presiden AEI, menyapa KORAN SINDO saat bertemu di sebuah mal di kawasan Semanggi, Jakarta, akhir pekan lalu. Menurut dia, itu salah satu bahasa Esperanto yang digunakan untuk menyapa, yang artinya "halo". Komunitas pengguna bahasa ciptaan L.L. Zamenhof yang merupakan seorang dokter mata asal Polandia ini memang selalu menggunakan bahasa tersebut saat berkumpul.

Menurut Ilia, bahasa Esperanto awalnya berasal dari Bialystok, Polandia. Masyarakat di sana memiliki

banyak bahasa dan etnis yang berbeda. Bukannya menjadi sebuah keberagaman, perbedaan itu sering menimbulkan konflik antaretnis. Prihatin dengan kondisi tersebut, L.L. Zamenhof tergerak menciptakan bahasa pergaulan tanpa membedakan etnis yang satu dengan yang lain.

"Intinya, Zamenhof ingin menciptakan bahasa yang mudah dipelajari dan diterima semua etnis. Tidak seperti Bahasa Inggris yang berubah sesuai *tenses* atau Jerman yang berubah sesuai *gender*," kata Ilia. Singkat cerita, Zamenhof akhirnya berhasil menyusun buku berjudul *Unua Libro (Buku Pertama)* tentang dasar-dasar bahasa pergaulan itu. Supaya diterima semua pihak, dia menggunakan nama pena Esperanto. "Dalam bahasa itu, Esperanto berarti orang yang berharap. Nama pena itulah yang akhirnya menjadi nama bahasa temuan Zamenhof," ungkap Ilia.

Setiap berkumpul, anggota AEI biasanya duduk dengan latar belakang bendera hijau dengan gambar bintang putih di pojok kanan. Bendera itulah yang digunakan sebagai identitas para esperantis, sebutan untuk pengguna bahasa Esperanto. Saat ini, anggota aktif AEI ada 12 orang. Tak banyak memang, namun mereka tergolong solid. Para pengguna bahasa Esperanto di dunia juga cukup banyak. Ini setidaknya dibuktikan oleh adanya Konferensi Esperanto di Jepang, beberapa waktu lalu.

Salah satu anggota AEI, Asfrina Liola mengaku terkesan dengan bahasa ini. Begitu juga rekannya,

Ĉefa Temo

Acep Nazmudin. Wanita yang akrab disapa Lio ini mengisahkan, bahasa Esperanto bisa dia pahami dengan cepat. Bukan hanya itu, Lio yang tidak fasih berbahasa Inggris ini ternyata bangga karena dengan satu bahasa Esperanto saja, dia bisa berkomunikasi dengan berbagai orang yang berbeda negara.

“Banyak pengalaman dan manfaat yang saya dapat dari mempelajari bahasa ini. Bahasanya sangat mudah dipahami, tidak seperti bahasa lainnya,” ungkap Lio.

Tak cuma Lio, berkat bahasa itu pula, Iliia bisa berkomunikasi dengan warga negara lainnya dengan bahasa tersebut. Misalnya saat dia

melancong ke Vietnam, dia sempat merasa kesulitan karena masyarakatnya jarang ada yang menguasai Bahasa Inggris.

“Mereka bisanya Bahasa Prancis yang saya tidak bisa. Tapi saya beruntung karena di sana komunitas Esperantonya cukup besar. Kota Ho Chi Minh punya banyak esperantis. Akhirnya saya bisa jalan-jalan dengan leluasa bersama teman sesama pengguna bahasa Esperanto,” tuturnya.

Nah, bagi yang tertarik mempelajari bahasa ini, silakan bergabung di AEI. Tak ada syarat apa pun untuk menjadi anggota komunitas ini. Yang penting, semangat untuk belajar bahasa.

Iliia Sumilfia Dewi: ilia.dewi@gmail.com



Foti kune kaj montri librojn de Esperanto



Lerni kaj praktiki Esperanton kune

Raporto pri Datreveno de Ĝakarta E-Klubo

Dimanĉe, la 12an de Oktobro de 2014, Ĝakarta E-klubo festis la 4-an naskiĝtagon de la klubo. Ĝi simple okazis, kiel la festo en la pasintaj jaroj. Antaŭ ol la festo komenciĝis, alvenis nova amiko, kiu nomiĝas “Ria” kaj Ilia (la Prezidantino de Indonezia Esperanto-Asocio) helpis nin por rakonti al ŝi pri la historio de Esperanto kaj klarigi kiel eklerni Esperanton. Poste, ni (membroj de la klubo de Ĝakarta) diskutis kune pri la disvolviĝo de nia klubo, ek de la programo de laboro al la evento de programo kiun ni preparos. Post kiam la diskuto finiĝis, ni preparis datrevenan kukon kaj vorton de gratulo al ĉiu membro por nia klubo. Antaŭ ol blovi la kandelon, Eko Nur Syah (la Prezidanto de Ĝakarta E-klubo) gratulis al nia klubo kaj transdonis sian esperon al nia klubo. Acep, Ria, Ilia kiel prezidantino de Indonezia Esperanto-Asocio, kaj mi mem ankaŭ faris ĝin.

Finfine ni festis la ĉefan programeron. Ni metis la kandelon en la kukon kaj ekbruligis ĝin, kantis “Bonan Naskiĝtagon” esperante, kaj kune blovis la kandelon kaj aplaudis. Poste ni tranĉis, dividis, kaj manĝis la kukon dum ni diskutis kune. Kvankam la datrevena festo de la Ĝakarta E-klubo estis tre simpla, ni sentis nin feliĉaj ĉar ĉiujare nia klubo povas festi ĝin. Ni esperis ke nia klubo disvolviĝos, fortiĝos, kaj konsekvencos. Ni ankaŭ esperis ke pli multaj homoj venos al la klubo por lerni kune kaj ni sukcese disvastigos Esperanton al la homoj, kaj povos festi la 5-an, 6-an, 7-an, 8-an, 9-an, 10-an, ktp datrevenon de nia klubo. Feliĉan Datrevenon por la Ĝakarta E-klubo kaj Kuraĝon!



La kuko de la datreveno de Ĝakarta Klubo

Minggu, 12 Oktober 2014, klub Esperanto Jakarta merayakan ulang tahun klub yang ke-4. Perayaan tersebut berlangsung sangat sederhana, seperti halnya perayaan pada tahun-tahun sebelumnya.

Sebelum perayaan dimulai, kami kedatangan teman baru yang bernama “Ria” dan Ilia (Presiden Asosiasi Esperanto Indonesia) membantu kami menjelaskan sejarah Esperanto dan cara belajar bahasa Esperanto kepada teman baru kami “Ria”. Setelah itu, kami para anggota klub berdiskusi tentang perkembangan klub kami, mulai dari diskusi program kerja sampai schedule event yang akan kami siapkan.

Setelah selesai, kami pun menyiapkan kue ulang tahun dan ucapan selamat dari masing-masing anggota untuk disampaikan. Sebelum tiup lilin, Eko Nur Syah (Presiden klub Esperanto Jakarta) menyampaikan ucapan selamat dan harapannya kepada klub Jakarta. Dilanjutkan dengan Acep, Ria, Ilia sebagai Presiden Asosiasi Esperanto Indonesia, dan terakhir dari saya sendiri.

Akhirnya, kami sampai ke acara tiup lilin dan menyanyikan lagu selamat ulang tahun dalam bahasa Esperanto. Setelah lagu selesai, kami bersama-sama meniupnya dan bertepuk tangan dan akhirnya kami memotong, membagikan, dan menikmati kue sambil berbincang-berbincang. Meskipun perayaan ulang tahun klub kami sangat sederhana, kami sangat senang karena setiap tahun kami bisa berkesempatan merayakan ulang tahun klub kami. Kami berharap agar klub Esperanto Jakarta semakin terus berkembang, solid, konsisten, semakin banyak yang datang ke klub Jakarta untuk belajar Esperanto, sukses menyebarkan Esperanto kepada orang-orang, dan nantinya kami tetap akan bisa merayakan ulang tahun klub kami yang ke-5, 6, 7, 8, 9, 10, & seterusnya. Selamat Ulang Tahun klub Esperanto Jakarta “ESPERIGA SUNO” dan SEMANGAT!

Verkita de Asfrina Liola



La membroj de Ĝakarta Klubo (Esperiga Suno)



Lerni kaj praktiki Esperanton kune ekstere



Feliĉan 4-a Datrevenon de Ĝakarta Klubo, je la 12a de oktobro 2014



Blovi la kandelon kaj tranĉi la kukon de la datreveno de Ĝakarta Klubo

La Vizito de Du Eksterlandaj Gastoj

Je la 7-a de septembro de 2014, 2 eksterlandaj geesperantistoj vizitis Ĝakarton kaj partoprenis komunan kunvenon de Ĝakarta E-Klubo. Ili estis Neil de Londono (Britio) kaj Anna de Barcelono (Hispanio). Tiam ĉeestis 8 personoj.

Unue ni salutis kaj enkondukis unu la alian. Estis kelkaj novuloj, do s-ino Ilia helpis ilin. Poste, Neil kaj Anna rakontis pri sia vojaĝsperto en Indonezio. Fakte, antaŭ ol ili iris al Ĝakarto, ili vizitis kelkajn aliajn lokojn kiel Jogja, Bali, kaj Kalimantan. Ili diris ke ilia vojaĝo al Kalimantan estis la plej mirinda, ĉar ili povis vidi orangutanon tie.

Poste s-ino Ilia donis iom da leciono por la novuloj. Intertempe, mi kaj Liola kiel mezniveluloj babilis kun Anna kaj Neil pri Indonezio. Estis agrable. Kiam s-ino Ilia finiĝis instrui la novulojn, ni ĉiuj kune ludis. Mi kaj Anna estis en la sama teamo. La novuloj estis kun Neil. Fine, mia teamo venkis la ludon kaj ricevis donacon.


En la fina parto de la kunveno, ni ĉiuj praktikis babili. S-ino Ilia gvidis kaj helpis la novulojn por praktiki. Post kiam la babilado finiĝis, ni kune fotis. Mi estis tre ĝoja. Dankon pro niaj gastoj!

Pada tanggal 7 September 2014, klub Esperanto Jakarta kedatangan dua orang tamu, yaitu Neil dari London serta Anna dari Barcelona.

Pertama-tama, mereka memperkenalkan diri lalu bercerita seputar pengalaman mereka di Indonesia. Selanjutnya kami yang bercerita tentang Indonesia, sementara Ilia mengajarkan Bahasa Esperanto ke para pemula. Setelah itu, kami mengadakan permainan dan tim saya (saya dan Anna) akhirnya menang dan mendapatkan hadiah.

Terakhir, kami praktik berbicara dengan Neil dan Anna serta berfoto bersama.

Verkisto: Eko Nur Syah



Nun haveblas en indonezia lingvo!

*La libro de Stano Marček
"Esperanto laŭ Reĝta Metodo"*

ĵus eldoniĝis en la indonezia lingvo. Ĝia titolo estas "Esperanto dengan Metode Langsung".

Tradukita de 4 indoneziaj esperantistoj, tiu ĉi libro helpas vin pli rapide kaj pli facile lerni la internacian lingvon, Esperanto.

Vi povas aĉeti ĝin kontraŭ Rp. 45.000/libro.

*Kontaktu **Ilia Dewi** ĉe 08111773387 aŭ
estraro-indonezia-esperanto-asocio@googlegroups.com*



Raporto pri Nova E-grupo en Jogjakarto

La pasintan 16an de oktobro komenciĝis en Jogjakarto E-kurso realigita de Ivan Garcia. Li estas hispana studanto de la Indonezia lingvo kiu alvenis al Indonezio la pasintan septembron kaj volas disvastigi la internacian lingvon en nia lando.

Li renkontis la esperantiston, Heidi Goes kaj ricevis multajn materialojn por instrui kaj montri Esperanton al la indonezianoj. La semajna klaso havas jam ĉirkaŭ naŭ komencantojn kaj okazas tenita en la biblioteko de UGM. La lernantoj estas tre motivitaj kaj interesitaj pri lernado de Esperanto.

Ili multe deziras povi paroli kun aliaj esperantistoj en la mondo. Ili intenco estas krei klubon en Jogjakarto en la estonteco kaj havi renkontojn kaj kongresojn inter la diversaj grupoj de E-klubo en Indonezio.

Pada tanggal 16 Oktober yang lalu berlangsung di Yogyakarta kurso Esperanto yang diprakarsai oleh Ivan Garcia. Dia adalah mahasiswa bahasa Indonesia dari Spanyol yang datang ke Indonesia pada September yang lalu dan ingin menyebarkan bahasa Internasional Esperanto di negara kami.

Dia bertemu dengan esperantis, Heidi Goes dan menerima banyak materi untuk mengajar dan menunjukkannya ke orang-orang Indonesia. Kelas yang diadakan setiap minggu sudah mempunyai sekitar 9 pemula dan bertempat di perpustakaan UGM (Universitas Gajah Mada). Para peserta sangat termotivasi dan tertarik belajar bahasa Esperanto.

Mereka sangat ingin untuk bisa berbicara dengan esperantis lainnya di dunia. Ke depannya mereka berkeinginan mendirikan klub Esperanto di Yogyakarta dan mengadakan pertemuan serta kongres antara berbagai klub Esperanto di Indonesia.

Verkisto: Ivan Garcia



Ivan Garcia, esperantisto el Hispanio, kune kun geesperantistoj el Jogjakarto

Varbu Membrojn por Nia Asocio

Se vi estas indoneziano kaj interesiĝas pri Esperanto aŭ eĉ jam lernas aŭ parolas tiun neŭtralan lingvon, vi nepre konsideru **membriĝi al la Indonezia Esperanto-Asocio**. Tiel vi **plifortigos** la asocion, kiu laŭstatute reprezentas la indoneziajn esperantistojn ĉe aliaj asocioj kaj instancoj, kaj celas disvastigi Esperanton en Indonezio.

Kiel membriĝi?

Simple! Necesas fari nur du paŝojn, do ne prokrastu. Unue vi aliĝu per la [reta aliĝilo](#) kaj tuj poste vi pagu la kotizon (150.000rp por normala membro, 100.000rp por senlaboruloj, studentoj kaj pensiuloj) al Bank Mandiri, No. Rek: 070-00-0479801-8 nome de Sondang I.S.D. Jen ĉio!



Jika Anda orang Indonesia dan tertarik dengan bahasa Esperanto atau bahkan telah belajar atau telah menggunakan bahasa netral ini, ada baiknya Anda pertimbangkan untuk menjadi anggota Asosiasi Esperanto Indonesia. Dengan demikian Anda dapat memperkuat asosiasi yang berdasarkan statuta asosiasi merupakan perwakilan bagi penutur bahasa Esperanto Indonesia yang berada di asosiasi atau instansi lainnya dan bertujuan untuk menyebarkan bahasa Esperanto di Indonesia.

Bagaimana cara mendaftar?

Mudah! Hanya perlu lakukan dua langkah, jadi jangan ditunda. Pertama-tama, Anda mendaftar melalui [formulir](#) online di tautan berikut ini: <https://docs.google.com/forms/d/1X8ZmVHnRpV58H-pj3jCYERdn6uBExP13KKBDye3Vk-8/viewform> dan setelah itu Anda membayar iuran anggota (Rp.150.000 untuk umum, Rp.100.000 untuk yang belum bekerja, mahasiswa dan pensiunan) ke rekening Bank Mandiri, No. Rek: 070-00-0479801-8 atas nama Sondang I.S.D. Hanya itu!

Untuk memberikan kemudahan dalam pembayaran iuran anggota, pembayaran dapat dicicil 3 kali dengan periode April, Agustus, dan December.

Marilah bergabung untuk memperkuat gerakan Esperanto di Indonesia!

Terima kasih! Dankon!

Membriĝu!

Aliĝu!

Kontribu!

Keanggotaan IEA terbuka bagi semua rakyat Indonesia. Yang penting Anda yakin akan pentingnya sebuah bahasa internasional yang mudah dipakai dan mendukung penyebarannya. IEA juga mengundang klub-klub Esperanto yang hendak bekerja sama atau mengikuti kegiatan yang ada. Hubungi pengurus IEA melalui estraro-indonezia-esperanto-asocio@googlegroups.com.

Biaya keanggotaan tahun 2015 adalah Rp 100.000,00 bagi pelajar dan pensiunan, serta Rp 150.000,00 bagi yang lainnya, yang dapat dibayarkan melalui Bank Mandiri a/n Sondang I.S.D., no. rek. 070-00-04789801-8.

Membreco en IEA estas malferma al ĉiu Indoneziano. Sufiĉas, ke vi kredu je la graveco de utila internacia lingvo, Esperanto kaj ĝia disvastigo tra la lando. IEA ankaŭ bonvenigas klubojn kiuj volas iĝi sekcio de IEA. Se tio interesigas vin, kontaktu la estraron ĉe estraro-indonezia-esperanto-asocio@googlegroups.com.

La membrokotizo estas Rp 100.000,00 por studantoj, senlaboruloj, kaj pensiuloj, kaj Rp 150.000,00 por aliaj. La kotizo estas pagebla tra Bank Mandiri, nome Sondang I.S.D., no. 070-00-04789801-8.

Avantaĝoj por Esti Membroj de Indonezia Esperanto-Asocio

1. Vi ricevas membrokarton kaj butonon kiel identigilo de membreco.
2. Vi regule ricevas organon de Esperanto en Indonezio kiun eldoniĝas 2 foje jare.
3. Vi rajtas kontribui artikolon, skribaĵon, ktp por riĉigi la enhavon de bulteno Esperanto en Indonezio.
4. Vi rajtas proponi por aliĝi al UEA senpage pere de subteno de KAEM.
5. Vi rajtas kandidatiĝi por iĝi reprezentanto de IEA en internacia aranĝo.
6. Vi rajtas ĉeesti en ĝenerale kunveno de IEA.
7. Vi rajtas kandidatiĝi aŭ voĉdoni por la elektado de estraranoj de IEA.
8. Vi havas prioritaton por akiri aktualan novaĵon de asocio kaj la movado.
9. Vi rajtas partopreni en Indonezia Esperanto-kongreso kaj aliaj eventoj kun speciala kondiĉo.
10. Vi povas aĉeti librojn kaj aĵoj de asocio kun speciala rabato.

Informo de Internaciaj Esperanto-aranĝoj en Azio

Jen mi listigas Esperanto-eventojn, kiuj okazos en Azio en la jaro 2015. Se vi volus aldoni iun Esperanto-eventon, senhezite aldonu sube.

- | | | |
|------------|---|---|
| 2.20-22 | : | La 2-a Srilanka Esperanto-Kongreso (Srilanko) |
| 2.26-3.8 | : | La 11-a internacia Himalaja Renkontiĝo (Nepalo) |
| 2.28-29 | : | Tutlanda Kurskunveno de Korea Esperanto-Asocio (Koreio/Taejon) |
| 4.4-5 | : | La 25-a Internacia Kurskunveno de Esperanto (Koreio/Chongdo) |
| 4.19 | : | Malferma ceremonio de Monda Esperanto-Filma konkurso (Ĉinio/Hangzuo) |
| 4.20 | : | Strategia Forumo de UEA pri Orientazia Movado'. (Ĉinio/Hangzuo) |
| 5.16-23 | : | La 11-a Ĉina Esperanto-Kongreso kaj la 67-a kongreso de Fervojistoj (Ĉinio/Kunming) |
| 8.18-20 | : | Internacia Junulara Renkontiĝo (Pakistano/Nankana-Sahibo) |
| 8.27-28 | : | La 2-a Irana Esperanto-Kongreso (Irano/Teherano) |
| 8.28-30 | : | La 1-a Internacia Kongreso de esperanto (Pakistano/Murree) |
| 10.8-11 | : | La 11-a Internacia Esperanto-Renkontiĝo de Meditado (Koreio/Seulo) |
| 10.10-12 | : | La 102-a Japana Esperanto-Kongreso (Japanio/Sendai) |
| 10.24-25 | : | La 47-a Korea Kongreso de Esperanto (Koreio/Seulo) |
| 10.31-11.1 | : | La Kongreso de Tyugoku kaj Sikoku (Japanio/Simonoseki, ĉe Esperato-Biblioteko) |
| 11.28-29 | : | Aŭtuna Kurskunveno en Lernejo Namkang (Koreio/Chongdo) |
| 12.25-26 | : | La 38-a Kongreso de Pakistana Esperanto-Asocio (Pakistano/Lahore) |

Anonceto:

Ni Ĝoje anoncis ke du Indoneziaj gejunuloj, Reza Pahlevi el Medan dan Yani K, Wulandari el Jakarta akiris la subvencion de KAEM (Komisiono de Azia Esperanto-Movado) por partopreni la 33an Komunan Seminarion en Hochiminh urbo je la 26an ĝis 28an de Decembro 2014. Ankaŭ la nuna prezidanto de IEA estas invitita al la Australia Esperanto-kongreso en Melburno kiu okazos je la 2an ĝis la 11an de Januaro 2015. Dezirante belajn aranĝojn kaj sukceson!

Informo pri La 100a UK en Lille kaj Gazetara Kampanjo



100^a Universala Kongreso de Esperanto
Lillo (Lille), Francio
25 julio – 1 aŭgusto 2015



De la unua... ek al la dua.

Pli sciigi pri la 100^a Universala Kongreso:
www.uea.org/kongresoj
www.lille2015.fr

Vizitu kaj ŝatu nin en Facebook!
"lille2015"



Bonvenon en Francion!

Escepte estos la okazo festi la centan Universalan Kongreson de Esperanto ĝuste en la regiono, kie okazis la unua! En Lillo, bela ĉefurbo de norda Francio, vi malkovros tute tipan arkitekturon, ŝatos bonvenigan etoson, kaj povos facile iri ĝis la proksima urbo Boulonjo-ĉe-Marŝo laŭ la paŝoj de L.L. Zamenhof.

La Lilla kongresejo oportune troviĝas proksime al la stacidomoj kaj rande de la urbocentro. Tie vi ĝuos buntan, altkvalitan programon preparitan speciale por tiu elstara evento.



Francio estas monde famkonata pro diversaj pejzaĝoj, longa historio, kulturo kaj kuirarto. Dum viaj ekskursoj antaŭ, dum aŭ post la kongreso vi spertos la kulturelan riĉecon de la lando.

Lillo situas kerne de triangulo Londono – Bruselo – Parizo (je 80 minutoj for de Londono, 36 minutoj for de Bruselo, 60 minutoj for de Parizo kaj 50 minutoj for de la pariza flughaveno Roissy-CDG).

Norda Francio estas la plej juneca regiono en la lando kaj unu el la plej loĝataj en Eŭropo. Pordo de Francio al norda Eŭropo, la regiono mirigas kaj mirindas.



Riĉa heredaĵo

Rigardante al la estonteco, Lillo tamen fiere konservas siajn historion, tradiciojn kaj identecon. La urbon konkeris laŭvice la flandroj, la britoj, la nederlandanoj, la hispanoj kaj la francoj. Tiuj epokoj plu videblas en miriga arkitekturo kun diversaj influoj.

Tiel en Lillo kunestas malnovo kaj novo. La riĉeco de la diversepokaj stiloj donas evidentan ĉarmon al la urbo.



"En Bulonjo-sur-Marŝo kunvenis ne francoj kun angloj, ne rusoj kun poloj, sed homoj kun homoj" – L.L. Zamenhof

Ĝuu en Lillo kaj Bulonjo-ĉe-Marŝo la internacian amikecan etoson de tiu historia regiono Esperantuja! Tie vi trovos spurojn de la unua kongreso.



Lillo estas urbo plej agrabla. Laŭ ĝiaj stratoj vi trovos luksajn butikojn kaj butikoplenajn piedstratojn, artgaleriojn kaj multkolorajn stratbazarojn...

Karbonado, "potjevleesch" (potetviando), fromaĝoj kaj tradiciaj bieroj: tiujn trezorojn vi frandu en centjaraj tavernoj aŭ plej modernaj restoracioj, kie la franca kuirarto kunigas lokajn tradiciojn kaj internaciajn receptojn.

Svarma kulturo

Kulturo grave rolas en Lillo, kiu enkalculas 20 muzeojn. Goya, Delacroix kaj Rodin briligas la Belartan Muzeon (dua plej ampleksa muzeo en Francio, post Louvre).



En la najbara urbo Roubaix naĝejo iĝis unu el la plej belaj muzeoj en Francio. La nova muzeo Louvre-Lens malfermiĝis en 2012 sine de mineja areo kaj jam ravis centmilojn da vizitantoj.

Dumjare okazas multaj festivaloj, paradoj, spektakloj, gravaj ekspozicioj... Rimarkinda estas la granda stratbazo de Lillo, kiu estas la dua plej ampleksa strat-evento en Eŭropo.

Sincero, gastigemo, festemo kaj bonetoso plene apartenas al la nordfranca, Lilla vivo.

Lillo estas urbo, kie vi ŝatos kongresi!



Kotiztabelo por la Universala Kongreso

La kotizoj varias depende de la loĝlando de la aliĝanto, laŭ la jena grupigo:

A: Ĉiuj landoj escepte de tiuj de kategorio B.

B: Lamaj socialismaj landoj de Eŭropo; ĉiuj landoj de Azio (escepte de Israelo, Japanio kaj Korea Respubliko), Afriko kaj Latina Ameriko.

La kotizoj estas pagendaj al la konstanta adreso aŭ al landa peranto. La CO en Roterdamo akceptas aliĝilojn ĝis la 15-a de junio 2015. Post tiam, oni aliĝu surloke dum la UK.

POR ELEKTI LA ĜUSTAN KOTIZON BONVOLU ATENTE LEGI LA ĈI-PAĜAJN KLARIGOJN.

Validaj kongreskotizoj por la 100-a UK

KONGRES-KOTIZOJ VALIDAJ (ĉiuj en eŭroj)	ĝis 2014.12.31 1-a periodo		ĝis 2015.03.31 2-a periodo		ekde 2015.04.01 3-a periodo	
	A	B	A	B	A	B
Aliĝkategorio						
1. Individua membro de UEA (ne inkluzivas MG)	180	135	225	170	270	205
2. Ne individua membro de UEA	225	170	280	210	340	255
3. Komitatano / kunulo / junulo / handikapulo, mem individua membro de UEA	90	65	115	80	135	95
4. Kunulo / junulo / handikapulo, ne individua membro de UEA	135	100	170	125	205	150

DIFINOJ

Individua membro de UEA: Dumviva Membro (DM), Membro kun Jarlibro (MJ aŭ MJ-T), Membro-Abonanto (MA aŭ MA-T). *Ne temas pri Aligitaj Membroj kaj ne inkluzivas Membrojn kun Gvidlibro (MG).*

Komitatano: Tiu, kiu estas membro aŭ observanto en la Komitato de UEA en la momento de aliĝo.

Kunulo: Tiu, kiu loĝas samdirekte kun la ĉefaliĝinto. Ĉefaliĝinto oni konsideras personon, kiu pagas kotizon en kategorio 1 aŭ 2.

Junulo: Tiu, kiu naskiĝis inter 1985.01.01 kaj 1994.12.31 (inkluzive). Oni nepre notu la naskiĝdaton sur la aliĝilo.
Handikapulo: Tiu, kies handikapo nepre postulas akompananton (ekzemple blindulo), kaj kiu pruvis tion per kuracista aŭ simila atestilo, kiu klare indikas la tipon de handikapo.

Senpage aliĝas:

- Infanoj kaj gejunuloj naskiĝintaj post 1994.12.31;
- Nemalhaveblaj akompanantoj de handikapuloj.

La kotizo ne estas repagebla, senkonsidere ĉu la aliĝinto ne povas partopreni la Kongreson pro propra volo aŭ pro iu ajn ekstera kaŭzo, eĉ se la Kongreso ne okazas, aŭ okazas en alia urbo.

La kotizo ne inkluzivas loĝadon, ekskursojn, bankedon kaj eventuale aliajn aparte pagendajn aferojn pri kiuj informoj kaj mendiloj aperas en la Dua Bulteno. La kotizo inkluzivas nenian asekuron.

Kongresaneco ne estas transdonebla al alia persono.

Por la limdatoj kaj aliaj kondiĉoj validas la dato de ricevo de la pago en la CO aŭ ĉe peranto. Aliĝilon sen kompleta pago oni ne traktos.

Kongresa Regularo (ekstrakto): "8. Kongresanoj devas fari nenion, kio kontraŭas la Kongresan Regularon, aŭ malutilas al la UK, kaj devas submetiĝi al la leĝoj de la lando, kie okazas la UK."

Kiu subskribas ĉi tiun aliĝilon, konfirmas sian respekton al la Kongresa Regularo kaj la laŭstatuta neŭtraleco de UEA, kiu organizas kaj aŭspicias la Universalajn Kongresojn.

Se vi pagas al peranto, bonvolu sendi ankaŭ la aliĝilon al tiu. Se vi pagas rekte al konto de UEA, sendu la aliĝilon al Roterdamo.

Aktivuloj, Membriĝu al UEA Subvenciite de "Fondaĵo Azio de UEA"

Estas malfacile por esperantistoj loĝantaj en nepagipovaj landoj membriĝi al UEA pro financa kialo, tamen certe vi volas esti membroj de UEA. Do sendu jenan peton al KAEM. Se KAEM konstatas, ke vi estas diligentaj esperantistoj, ĝi aligas vin al UEA senpage kaj vi ricevos la belkoloran organon "Esperanto" 11 fojojn jare aŭ retan version. Vi ne plu estos izolitaj esperantistoj, sed en la rondo de la monda esperantistaro.

Aliĝ-maniero

1. Skribu jenajn tri aferojn.
 - a. Viaj nomo, adreso, retadreso, naskiĝdato, profesio, kariero en Esperantujo ktp.
 - b. Viaj agadoj por la movado en 2014 kaj planoj en 2015.
 - c. Membreco: MG, MJ(-T) aŭ MA(-T), kaj UEA-kodo, se vi havas ĝin.
 - *MG: kun Gvidlibro tra la Esperanto-movado kaj la revuo Esperanto rete.
 - MJ(-T): kun jarlibro kaj la revuo Esperanto rete (kaj ĝis inkl. 29 jaroj membro de TEJO kun Kontakto).
 - MA(-T): kiel MJ(-T) plus la revuo Esperanto.
2. Sendu rete al s-ro INUMARU Fumio inumaru-f@nifty.com.
Aŭ sendu ĝin poŝte al KAEM: ĉe Japana Esperanto-Instituto (JEI)
Japanio 162-0042 Tokyo-to Sinzyuku-ku Waseda-mati 12-3
 - * Skribu "Projekto C" kiel titolon aŭ sur la koverto.
3. Limdato: la 30a de novembro 2014.



Berkaitan dengan hari Esperanto tahun 2014 pada tanggal 26 Juli dan Kongres Esperanto Internasional di Buenos Aires, Argentina, Asosiasi Esperanto Indonesia (IEA) menghimbau kepada teman-teman esperantis Indonesia untuk berpartisipasi memperkenalkan bahasa Esperanto di lingkungan dan komunitasnya dengan melakukan kampanye Esperanto.

Untuk mendukung kegiatan tersebut, IEA menjual PIN seharga Rp. 2500/pc.

Bagi yang ingin memesannya, silakan menghubungi Iliá, melalui e-mail: estraro-indonesia-esperanto-asocio@googlegroups.com.

Esperanto Unuigos la Homaron!

• Partopreninte la 24an Internacian Kurskunvenon de Esperanto en Fukuoka, Japanio

Mi estas konata kiel Mondero en Esperantujo. Mi estas Esperanto-parolanto en Hankuk Universitato de Fremdaj Studoj, kaj aktivis kiel kunlaboranto en Olivo.

Ĉi-januale mi vojaĝis al Tajvano pere de Esperanto kaj spertis la amikecon, kiun Tajvano-loĝantoj montris. Mi esperantistiĝis antaŭ pli ol sep jaroj, tamen mi havis neoftan oportunun kor-ricevi la vastecon kaj amikecon, kiujn Esperantujo havas. La vojaĝo al Tajvano estis nur komenco. Mi malsatis je Esperanta aero.

Tiam, kiam mi aŭdis pri la 24-a Internacia Kurskunveno de Esperanto (IKE) en Fukuoka, Japanio, mi pensis ke ĝi eble montros al mi la eksterlandan vivecon de Esperanto, ĉar mi neniam partoprenis iun kongreson aŭ oficialan kunsidon de Esperanto en fremda lando. La lingvo jam montris grandiozecon al mi, tamen mi supozis, ke tiom neniel estus la limo de la lingvo en si. Mi iris al Japanio, tamen verdire mi iris al Esperantujo.

Flankenlasante la detalan programon aŭ nomojn de ge-amikoj en la 24a IKE, mi volas diri, kion mi ricevis en Fukuoka. Se mi havus cent paĝojn da spaco, eble mi povus skribi ĉion preskaŭ.

Mi, Brila (OH Soonmo) kaj s-ro SHIN Youngmuk (edzo de Brila) kune flugis al Fukuoka en la 4-a aprile. Al mi la eniro en la aviadilon estis tre mirindega. Mi malfacile enaviadiliĝis nur unu minuton antaŭ ĝia ekflugo! En la Incheon Internacia Flughaveno oni urĝe vokis mian nomon kaj mi kuregis al la enirejo! Finfine kiam ni tri atingis Fukuoka-n, s-ino Muto atendis nin en la flughaveno kaj gvidis nin al la stacidomo Hakata. Ni kune ĝuis vespermanĝon kaj interparoladon kaj tranoktis en ŝia domo.

En la sekva tago, ni vizitis la kastelon Fukuoka. Ni ne havis sufiĉe da tempo por senti ĝian tutan belecon, tamen ĝi jam kortuŝis nin. S-ro SHIN restis tie kaj plu ĝuis la kastelon, kaj aliaj iris al la domo de ges-roj Matsumoto per trajno.

Kelkaj esperantistoj estis en la domo. Ni intersalutis unu la alian. Fakte, ni uzis ne nur Esperanton, sed ankaŭ la japanan, ĉar mi kaj Brila iom studis japanan lingvon. Danke al ilia helpo, ni rekte iris al kurskunvenejo per aŭto.

Kiam ni atingis la kurskunvenejon, oni salutis nin elkore. Estis interese, ke la aero de Esperanto plenis

en la ejo, kaj ke oni kutime uzis Esperanton, kvankam ili preskaŭ ĉiuj estis japanoj. Post malfermo, oni libere interparolis kaj post iom da tempo, diversaj kursoj komenciĝis.

Mi partoprenis en la kurso de Ago Feitosa el Brazilo. Lia kurso ne havis specialan celon sed senmure interparolis pri diversaj temoj nur Esperante. La temoj estis tre improvizaj sed profundaj: Dio, Norda Koreio, Prostituo, Milita Servo, USIM-karto en Koreio, Sekreto en japanaj monbiletoj kaj moneroj ktp. Mi ne povas kalkuli, kiom da temoj estis interparolitaj. Tiuj tre plaĉis al mi, ĉar ili ne estus kapteblaj, se mi ne lernus Esperanton.

En nokto okazis amuzega festo. Ni kune drinkis bieron kaj ĝuis amikecon. Tio, ke mi estas el Koreio, nur signifis, ke mi povas prezenti fremdajn kulturojn al ili. Pri malamikeco aŭ strangeco neniom troviĝis inter ni. Estis unuafoje, ke mi ekzistis nur kiel unu homo, sen aliaj flankoj.

Sekvan tagon, manĝado kaj studado daŭris. Mi tre ĉagreniĝas, ĉar kun vortoj mi povas bildi nur imagojn de la kurskunveno, sed ne povas porti la aktualan senton. Se poeto partoprenus en ĝi, li/ŝi povus bone priskribi la grandiozajn momentojn de la evento. Pro manko de tempo, mi iom frue forlasis la IKE-n kaj amindajn geamikojn. Kun s-ro SHIN mi revenis al Koreio.

Mi vivas kun Esperanto. Mi renkontas multajn homojn, kiuj provis lerni Esperanton sed finfine malsukcesis. La plej ordinara kialo rezigni la lernadon estas manko de motivo, mi pensas. Ekzemple, en Olivo estas unu fremdulino el Paragvajo, kaj kiam ŝi membriĝis al Olivo, ŝi diris: "Mi fojfoje lernis Esperanton iom sed rezignis ĝin, ĉar ŝajnas al mi, ke Esperanto ne havas utilecon kaj uzeblecon."

Bonŝance, ŝi decidis lerni Esperanton denove. Kial? Mia partopreno en la kurskunveno ŝajnis al ŝi, ke Esperanto estas nun vivanta kaj multe da homoj parolas Esperanton, same kiel mi kaj Juno (LEE Hoyoung), vicprez. de Olivo, spertis la realecon de Esperanto de la vojaĝo en Tajvano. Por ŝi IKE senplanite iĝis la motivo. Facileco kaj intereso de Esperanto ne sufiĉis por ŝi, sed la kurskunveno ja influis ŝin.

Se vi poste havos ŝancon partopreni iun kongreson

Eksterlandaĵoj

aŭ kunvenon de Esperanto, bonvolu ne heziti, ĉar por iu via aktiva partopreno eble povas esti la plej granda motivo lerni la lingvon, kaj fariĝos certa pruvo, ke

vivas Esperanto. Per kaj post la 24a IKE en Fukuoka, mi ja povas memfide diri al la mondo: Esperanto unuigos la homaron!

SHIN Hyunkyu /
eksprez. de Olivo en HUFSS



Shin Hyunkyu kaj aliaj geesperantistoj (parto 1)



Shin Hyunkyu kaj aliaj geesperantistoj (parto 2)

Infano en Malriĉa Familio Ne Havas Frat(in)on

- **Vivo de koreoj**

Ju pli malriĉa estas la familio, des pli malfacile havi la duan infanon. Nombro de neunua¹ infano en lasta jaro ne atingis duonon de tio en la jaro 1981.

Familioj pli malriĉaj kaj needukitaj ne emas naski bebojn. S-ino Kim **, kiu kreskigas 5-jaran knabon, rezignis la taskon, kiu estas nasko de la dua infano. Tiu povus esti donaco al la knabo. Sed ŝia edzo, kiu laboras en malgranda firmao kontraŭ modesta salajro, persiste klopodis konvinki sian edzinon, ke ili havu la duan bebon. Sed li ŝanĝis sian opinion en tiu ĉi jaro pro la edukelspezo por la knabo. La knabo lernas nur du programerojn posttagmeze krom infanĝardeno. Kvankam la monsumo por edukado ne estas granda ol tiu de averaĝaj familioj, ili ne povis elteni. Kalkulante enspezon kaj elspezon la edzo konkludis, ke ili koncentru siajn fortojn al la unusola infano.

Plimultiĝas knab(in)oj sen frat(in)o. Laŭ la publika statistika servo, nombro de neunuj infanoj en familio malkreskas rapide. La nombro en lasta jaro malaltiĝis je 10% ol tiu de antaŭlasta jaro. Tiu nombro en lasta jaro ne atingis eĉ duonon de la jaro 1981, kiam komencis publikiĝi koncerna statistiko. Jen estas statistikaj nombroj de unuaj infanoj kaj postunuaj infanoj en la jaro 1981 kaj 2013. (*Bonvolu vidi la tablon de Rimarko 1!*)

Dum tiu periodo unuaj infanoj malmultiĝis je 130,000, sed postunuaj infanoj perdis nombron haste (malpli ol duone) dum sama periodo. Naskratio de 1 ino draste faliĝis de 2.57 ĝis 1.19. Tio estas severa krizo de nasko.

Unu kialo de naskoreduktiĝo povas esti, ke nunaj koreaj junuloj havas tendencon 'malfrue nuptiĝi'. Averaĝa aĝo de seulaj viroj por unuafoja edziĝo estis 28.4-jara en la jaro 1991. Jam ĝi superis 30-n en la jaro 2002 kaj 32.3-n en la jaro 2011. Simile averaĝa aĝo de seulaj inoj por unuafoja edziniĝo estis 25.6 en la jaro 1991, kaj atingis 30-n en la jaro 2011.

Maljuniĝinta geedziĝo rilatas al altiĝo de eduknilvelo kaj al malfrua eniro en ekonomian aktivadon. Krome rekono pri geedziĝo ŝanĝiĝis. Tamen tiu tendenco ne multe influas al la rariĝinta fenomeno de la duaj beboj. Signifo de neunuj infanoj en familio tute malsimilas al tio de unua infano. Geedzoj taksas la unuan bebon kiel naturan kaj ordinaran fenomenon.

Sed ili racie pensas pri neunuj beboj, ĉu por ili

avantaĝas bredi kaj eduki bebojn kontraŭ ekonomia kaj mensa premo.

Kelkaj parametroj troviĝas por havi la duan infanon. Jen estas tiaj: nivelo de eduko, stabileco de salajro de edzo, ekzisto de patrino de edzino.

Se edzo helpemas hejman taskon, kaj se geedzoj havas propran domon por loĝi, probableco de la dua infano altiĝas. Bredi infanojn al sola patrino estas tro korporema laboro. Al kiu juna patrino volonte petu la helpo de bredo? Jen estas patrino de panjo. Se edzo ne helpemas, kaj avino ne ekzistas, juna virino havas unu solan rimedon, rezigni la duan infanon.

Tiel nunaj koreaj junuloj pensas pri nasko de la dua infano: se kondiĉo permesas... Tial ju pli oni estas malriĉa, des pli oni zorgas malavantaĝon por havi la duan infanon.

La oficiala statistiko de la jaro 2003 ĝis 2009 montras, ke troviĝas diferenco inter familioj de la dua klaso kaj la kvina klaso² de enspezo. Proporcio de hejmo, kiu apartenas al la dua klaso, kun pluraj infanoj malgrandiĝis de 56.9% ĝis 49.6%. Kvankam tiu ŝanĝo ne okazis en hejmo de la 5a klaso.

En iu raporto troviĝas rilato inter edukadnivelo, ekonomio kaj nombro de familio. La raporto mencias: se ekonomia stagno severiĝas aŭ daŭras longe kaj malegaleco profundiĝas, geedzoj malaltnivelaj en eduko ne indas havi plurajn infanojn.

Oni diras, ke familio en vilaĝoj estas relative granskala ol tio en urboj, ĉar kamparo bezonas multajn laborojn. Sed la formulo "En vilaĝo troviĝas multaj infanoj." nuntempe ne plu taŭgas. Ne nur en metropolo sed ankaŭ en urbeto (eĉ malgranda vilaĝo) vastiĝas la fenomeno 'unu sola infano'.

Iu profesoro en koncerna fakto de Seoul Ŝtata Universitato diras, ke la fenomeno 'eviti la duan infanon' rilatas al kosto de loĝloko. Se familio havas pli da infanoj, ili bezonas plilarĝan spacon por loĝi. Alta kosto de domo malhelpas ekziston de la postunua infano.

Antaŭ kelkdek jaroj Koreio havis problemon, ke la loĝantaro eksplode kreskis, kaj la registaro planis restrikti infanonaskon³. Kvankam koncerna leĝo restrikti bebon ne ekzistis, tiama registaro kontrolis kaj konsilis naskon kun subteno al unu aŭ du gefilaj familioj. Tiu movado efikis siatempe, eĉ tro forte efikis.

Tiu ĉi analizo - tiuj ne emas naski bebon pli malriĉaj kaj pli malalte edukitaj - donas instruon. La slogano "Frat(in)on al la sola infano" ne tiel forte efikus.

La ŝtuparo por eniri en plialtan klason estas malaperanta en Koreio. Antaŭe malaltrangaj familioj havis esperon, ke iliaj gefiloj havos ŝancon eniri en plibonan klason pere de edukado.

Sed multaj koreoj opinias, ke jam klaso estas fiksita.

La malriĉaj kaj nemulte edukitaj ne volas heredi al siaj gefiloj ilian amaran sperton kaj statuson.

Ni devas fari cirkonstancon, ke infano ne havu diskriminacion laŭ la gepatra ekonomia nivelo, kaj havu justan ŝancon. Publika propono 'nasku la duan, la trian bebon' aŭ simila financa subvencio devas ligiĝi kun klopodo por ekonomia kaj socia egaleco.

BANG Myunghyun

1. De la dua ĝis la lasta.
2. En ekonomia termino oni dividas 5 grupojn, de 1-a ĝis 5-a. La 5-a klaso estas la plej riĉa, male la 1-a estas malriĉa.
3. Plej forta regulo troviĝas en Ĉinio. Registaro ĉina permesas nur 1 infanon. Tiu kontrolo sukcese funkciis dum kelkdek jaroj. Nuntempe ankaŭ ĉina registaro planas mildigi tiun restriktion.

	Unuaj Infanoj	Postunuaj Infanoj
1981a jaro	355.000	512.000
2013a jaro	224.000	211.000

La tabelo de rimarko 1

ESPERANTO EN INDONEZIO estas neregula bulteno por la indoneziaj esperantistoj kaj iliaj amikoj. Ĝin redaktas teamo de volontuloj kaj ĝi aperas danke al la kontribuoj de indoneziaj kaj alilandaj kunlaborantoj kaj al la donacemo de malavaraj subtenantoj. Nek la redaktantoj nek la kunlaborantoj ricevas ajnan rekompencan pro sia laboro. Al ĝi povas kontribui kiu ajn, se la kontribuajo konformas kun la celoj de la bulteno.

Por havi kiel eble plej kvalitan bultenon kaj por faciligi la laboron de la redaktantoj, ni petas ni ajn kunlaborantojn atente legi la sekvajn sugestojn/petojn kaj, laŭeble, sekvi ilin. Dankon!

- Akcepteblas tekstoj nur en Esperanto kaj la indonezia lingvo.
- Prefere verku nelongajn tekstojn en unu el la lingvoj menciitaj ĉi-supre kaj aldonu al ĝi resumon, maksimume centvortan, en la alia lingvo.
- Antaŭ ol sendi la tekstojn, nepre kontroligu ilin pere de aliaj (pli spertaj) kolegoj. Tio povas okazi kadre de Esperanta kunveno aŭ leciono, aŭ rete. La tekstoj estu kiel eble plej seneraraj kaj en bona stilo.
- Bonvolu sendi la tekstojn en unu el la jenaj formatoj: .txt, .rtf, .odt, .doc. Nur se vi ne povas sendi en unu el la ĉi-supraj formatoj, sendu en .wpd aŭ docx. Ne sendu .pdf-dokumentojn!
- Se vi uzas surogaton por la Esperantaj litoj, uzu la saman por ĉiuj literoj de la dokumento.
- Uzu nur unu litertipon por unu dokumento.
- Se eblas, sendu ankaŭ bildojn, laŭeble altkvalitajn, kaj nepre ne en la teksta dokumento. La bildoj devas veni aparte, kun la jenaj informoj por ĉiu: klarigo de la bildo (titolo) kaj fotinto. Se vi ne estas la fotinto, ne sendu foton sen la skriba permeso de ĝia aŭtoro. Atentu: ne sendu tro da bildoj en unu mesaĝo - iuj povus malaperi survoje.
- Sendu vian kontribuon per Facebook nur kaze, ke vi tute ne povas sendi retmesaĝojn, kaj resendu ĝin se vi ne ricevas konfirmon pri la ricevo.
- Bonvolu sendi la kontribuajojn kiel eble plej frue. Ne atendu ĝis la lasta momento.
- Estu preta reagi rapide al la petoj de la redaktoroj kaj respektu la limdatojn.
- Ĉiujn materialojn oni sendu al la jena retadreso: redakcio-ideo@googlegroups.com.

Se vi bezonas pliajn informojn aŭ klarigojn, bonvolu kontakti nin per la ĉi-supra retadreso.

La bultenon **ESPERANTO EN INDONEZIO** ricevas la membroj de IĖA. Por ne-membroj ĝi aĉeteblas ĉe la redakcio de IĖA (redakcio-ideo@googlegroups.com) kontraŭ 1 €/ekz aŭ Rp 12.000,00 + efektivaj sendokostoj. Donacantoj al la indonezia Esperanto-movado ricevas ĝin elektronike kaj laŭpete ankaŭ papere.

ESPERANTO EN INDONEZIO adalah sebuah buletin bebas untuk esperantis Indonesia dan kawan-kawan. Tim sukarelawan mengerjakannya dan buletin ini dapat terbit berkat para kontributor dalam dan luar negeri serta para donatur yang dermawan. Baik tim redaksi maupun kontributor tidak menerima kompensasi apa pun atas kerja mereka. Siapa pun dapat berkontribusi, asalkan selaras dengan tujuan buletin ini.

Agar buletin tercipta sebaik-baiknya dan untuk mempermudah pekerjaan redaksi, kami meminta seluruh kontributor membaca dengan teliti saran dan petunjuk berikut, dan sebisa mungkin mematuhi. Terima kasih.

- Redaksi hanya menerima tulisan dalam bahasa Esperanto dan Indonesia.
 - Ada baiknya menulis tulisan singkat dalam salah satu dari dua bahasa yang disebutkan di atas, dan berikan ringkasan (maksimum 100 kata) dalam bahasa satunya lagi.
 - Sebelum mengirim tulisan, sebaiknya periksalah tulisan tersebut lebih dahulu bersama orang lain yang lebih berpengalaman. Hal itu dapat dilakukan di pertemuan Esperanto, sebagai bagian dari pembelajaran, atau secara online. Kesalahan dalam tulisan sebisa mungkin diminimalisasi dan tulisan dibuat dalam gaya bahasa yang baik.
 - Mohon kirikan tulisan dalam salah satu format berikut: .txt, .rtf, .odt, .doc. Hanya jika Anda tidak bisa mengirimnya dalam salah satu format yang telah disebutkan, gunakan format .wpd atau .docx, jangan kirikan tulisan dalam format .pdf!
 - Jika Anda menggunakan 'pengganti' huruf Esperanto, gunakan format yang sama untuk seluruh dokumen.
 - Gunakan hanya satu jenis huruf untuk satu dokumen.
 - Jika mungkin, kirikan juga gambar (sebisa mungkin yang berkualitas tinggi), yang sebaiknya tidak disertakan dalam dokumen teks. Gambar dikirim terpisah dari tulisan, dengan informasi untuk masing-masing gambar berupa penjelasan/judul gambar dan pembuat foto. Jika Anda bukan pembuat foto, jangan kirikan foto tanpa izin tertulis dari pemiliknya. Perhatian: jangan mengirim terlalu banyak gambar dalam sekali pengiriman. Beberapa foto bisa saja hilang dalam proses pengiriman.
 - Silakan kirim kontribusi artikel Anda melalui Facebook, hanya ketika Anda sama sekali tak bisa mengirimnya lewat surel (e-mail), dan kirimlah pesan itu sekali lagi jika Anda tak menerima konfirmasi bahwa artikel Anda telah diterima.
 - Silakan kirim kontribusi Anda sesegera mungkin. Jangan menunggu hingga tenggat waktu.
 - Bersiaplah untuk bereaksi dengan cepat merespon permintaan redaksi dan mematuhi batas waktu.
 - Kirimkan seluruh materi ke alamat berikut: redakcio-ideo@googlegroups.com.
- Jika Anda memerlukan lebih banyak informasi dan penjelasan, silakan hubungi kami melalui alamat e-mail di atas.